Bertolt Brecht,

# La tajloro de Ulm

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

“Episkop’, mi flugos”,
diris tajloro al Moŝt’.
“Venu, por moment’.”
Kaj li grimpis kun flugiloj
en aplaŭdo kaj jubiloj,
ĝis la granda granda kirktegment’.
Lia Moŝt’ nur diris:
“Mensogoj, kiel ĉiam.
Hom’ birdo ne estas.
Homoj flugos neniam.”
La episkopo plu iris.

“La tajloro jam ne vivas”,
diris la homoj ĉe l’ Moŝt’:
“Trois la aŭdac’.
La flugiloj frakasiĝis,
la tajloro surnaziĝis
sur la dura dura kirkoplac’.”
Sonoriloj sonis.
“Mensogoj, kiel ĉiam!
Hom’ birdo ne estas.
Homoj flugos neniam”,
la episkopo admonis.

*Traduko de la Germana poemo “Der Schneider von Ulm” de* Bertolt Brecht *(∗1898 – †1956) en Esperanton de* Hans-Georg Kaiser *(Cezar, ∗1954-05-21).*

*Arg-1084-2183 (2014-08-06 13:31:54)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en* `http://cezartradukoj.blogspot.de/`*.*